
JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 90
Sept.-Oct. 1974

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



# ATENDANTE VIVON

# ENHAVO


Nukleaj Centraloj........................2-3

**Mia** avino vizitis strandon..............4-5

HEJS-loterio.............................6

Kontaktoj kun Kontakto................7-8-9

Korespondaj paĝoj......................10-11

Krucvortenigmo..........................12


La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne :eprezentas la oficialan opinion de HEJS escepte en oka- ;o de oficiala komuniko;ĝi ankaŭ ne reprezentas la opi- ıion de la Redaktoro;do,pri la artikoloj respondecas La aŭtoroj mem.

=====================

## NOTOJ:

**-Se vi rapidas,ankoraŭ vi povas pertopreni la fotan kon- :urson,kies premio estas 1.000 ptoj .La regularon de la :onkurso vi povas trovi en nº 86.Ni atendas viajn fotojn**

**-En nia lasta numero ni petis al vi tekstojn de hispanaj :antoj kantaĉeblaj dum ekskursoj por ke ni traduku ilin esperanten.Ĉu neniu el vi kantaĉas?Bonvolu sendi al ni l tekston!**

**-Ni atendas viajn opiniojn kaj sugestojn por la tendaro :iun ni projektas organizi.Ĉu vi projektas partopreni? Sciigu tion al ni.**

**-Kune kun nia bulteno,multaj el vi ricevis ekzempleron ( "Boletín",bulteno de Hispana Esperanto-Federacio.Per ĝi vi povas observi la staton de la hispana movado;kiel vi scias,HEJS estas la junulara sekcio de tiu organizaĵo. Ni disdonas hazarde tiun bultenon,do,se ankoraŭ vi ne ricevis,ne malesperu.**


# NUKLEAJ CENTRALOJ

Kelkaj landoj, daŭre tra la jaroj, organizis sian energisistemon surbaze, precipe, de petrolo. Tiuj landoj ne antaŭvidis la konsekvencojn kiujn kaŭzus la eksplodo de petrolkrizo aŭ ili ne deziris pritrakti tiun eblecon pro la simpla fakto ke petrolo estis tiam atingebla malmultekoste. Sed la ĉiam plia konscio de la landoj kiuj produktas (aŭ posedas) tiun petrolon pri la senfina kaj senduba ekspluatado de siaj naturriĉoj kaŭzis gravan energikrizon, kaj ĝuste la landoj kun plej gravaj problemoj estis tiuj landoj kiuj plej larĝskale enkondukis en sia energipolitiko la petrolon. Kaŭze de ĉio ĉi stariĝis la ideo ke neniu lando devas bazi sian energisistemon sur nur unu energirimedo, kiun krome tiu lando ne posedas aŭ ne produktas sufiĉe por kovri la proprajn bezonojn.

Tial disvastiĝis la opinio ke nur nukleaj centraloj kapablas solvi kontentige tiun mondproblemon. Sed, ĉu tio veras? Ĉu la danĝereblecoj de nukleaj centraloj estas jam solvitaj? Do, nun ni konstatas la ekziston de du malsamaj aspektoj, kiujn mi klopodos analizi surbaze de la jenaj demandoj:

-Ĉu la konstruado de nukleaj centraloj signifos energisendependecon por la landoj kies propraj energirimedoj ne kovras la enlandajn bezonojn?
-Ĉu energipolitiko kies bazo estos nukleaj centraloj estos la plej taŭga solvo por ekonomikrizo?
-Ĉu vere nukleaj centraloj estas danĝeraj?

Evidentiĝis ke energikrizo estas kaŭzita de iuj trustoj por tiamaniere solvi monajn kaj politikajn problemojn, kaj samtempe facile pligrandigi la profiton. Sed, estas ĝuste tiuj monopoligaj trustoj, nun agante sur la "nuklea cirklo", kiuj deziras konservi tiun privilegian situacion. Uranio elĉerpiĝos antaŭ dudek jaroj pro elsuĉa ĉerpado, laŭ prognozoj de internaciaj spertuloj. Aliflanke, la okcidenteŭropaj landoj ne eblos garantii memprovizadon de uranio. La nuna stadio en la evoluprocezo de la nuklea teknologio ne taŭgas por 100% enlanda konstruado de ĉiuj bezonataj iloj de nukleaj centraloj. Kaj, tamen, la oficiala klarigo pri la kialoj de la nuna nuklea energitendenco estas ke "ni klopodas atingi memprovizadon por ga-




REAKTORO

rantii nian sendependecon". Sed, bedaŭrinde, energirezervoj ne eblos kovri enlandajn bezonojn.

Do, per tiu energipolitiko daŭros la nuna dependa situacio kaj nia ekonomio daŭre estos en la manoj de tiuj multnaciaj monopoligaj trustoj kies celo estas pligrandigi la enspezojn de plej malmultaj personoj je la kosto de la plimulto. Kaj tial verŝajne estos pli gravaj kaj pli malfacile solveblaj estontaj ekonomikrizoj, kies nuraj profitantoj estos denove tiuj trustoj. Kaj ankaŭ estas la multekosta prezo de tiuj centraloj kompare al aliaj eblecoj; ekzemple, sunenergia centralo sampotenca estas 500 oble malpli kosta ol nuklea centralo kaj ne polucias, kvankam ankoraŭ havas teknikajn problemojn de ne malfacila solvo.

Malgraŭ ĉio la domaĝoj ne estas bremsilo por la superregantaj trustoj kaj la danĝereblecoj estas diversaj: ne solvitaj teknikaj problemoj, ne sekureco de funkciado, ne sperteco kaj ne kalkulitaj rezultoj, naskigo de ekonomiaj konsekvencoj. Poluciado de aero, akvo kaj teroj per atmosfera kaj akva medioj pro forigo de gasaj kaj likvaj restaĵoj; troaj ne antaŭviditaj maltrafoj; plivastigo de malsanoj en apudaj zonoj; ne akordigebleco kun agrikulturo, turismo, fiŝkaptado, ktp.

La brita registaro kaj ok usonaj ŝtatoj malpermesas la instalon de nukleaj centraloj per malpeza akvo, ĝuste la tipo kiun klopodas instali en Eŭropo la elektraj entreprenoj aŭ monopoloj. Aliaj registaroj studas paralelajn paŝojn, kiel Svislando, Svedio kaj FR Germanio.

Rezume, mi opinias, aŭdinte diversajn favorajn kaj malfavorajn eldirojn, ke momente ni devus rezigni la instalon de nukleaj centraloj per malpeza akvo ĝis kiam la teknologio garantios plenan sekurecon (svedaj sciencistoj konsilas konstruitiajn centralojn je 20 kmj. de plej proksima loĝanta komunumo) kaj tiuj centraloj ne okazigos danĝerajn konsekvencojn por la homaro.

**JUAN AZCUÉNAGA**

# MIA AVINO VIZITIS STRANDON

Mia avino kvamkam maljuna - ŝi preskaŭ estas okdek jaraĝa - sin sentas moderna, kuraĝa kaj optimista. Si fartas bone kaj havis la mirindan ideon - por la unua fojo viziti la strandon.

Tio estas nenia novaĵo, ĉar ja estas multaj maljunuloj, kiuj sin banas en la maro, sed mia avino neniam antaŭe vidis la maron, do ŝia scivolemo estis granda.

Mia avino kaj mi, krom nepo kaj avino, estas tre bonaj geamikoj. Ofte ŝi demandas al mi pri multaj aferoj de la nuna junularo kaj mi plezure respondas kaj informas ŝin, do, estas nenia miraklo ke inter siaj nepoj ŝi elektis min por ŝin akompani al la strando.

Ŝerce mi diris al mia avino, ĉu vi surmetos bankostumon? ĉu ĝi estos dupeca aŭ unupeca?. Ho! ne, ŝi respondis; se mi havus dudek jarojn, la afero estus alia, mi nur metos miajn piedojn en la akvon kondiĉe ke ĝi ne estu malvarma.

Mia avino interesiĝis multe pri la homoj ol pri la maro. Por ŝi la maro estas grandega rivero en kiu ne estas videbla, la alia flanko. Pri la homoj kiom da demandoj ŝi faris al mi. Ĉiumomente ŝi atentigis min pri io ajn.

Alvenis junulo kaj junulino kaj tie en la strando, ili eksenvestiĝis. Mia avino tion ne povis kredi. Rigardu, Ludoviketo - ŝi diris al mi + tiun paron de gejunuloj, kiel senhonte ili demetas ĉiujn siajn vestaĵojn; ne^ĉiujn, mi klarigis al mia avino, ĉar vi jam vidos kiel ili jam kunportas surmetita bankostumon.

Plaĉis al mia avino rigardi la homojn, Plaĉis al mia avino ĝui iomete la nunan liberon, kiun aktuale havas la junularo. Mia avino ne sopiras pasintajn epokojn, ŝi estas moderna, progresema kaj pro tio ege al ŝi plaĉas la nuna vivformo, malgraŭ tio, ke ŝi ofte ricevadis grandajn surprizojn, ne ĉiam agrablaj.

Mia avino rakontis al mi pri siaj junaj jaroj, precipe pri tiutempaj vestaĵoj, ĉar ankaŭ estas granda novaĵo por ŝi, la mallongaj jupetoj kaj pantalonojn. Kiom da subvestaĵoj mi devis kunporti kiam mi estis juna !, ŝi melankolie rememoris.

Dum momento en nia promenado mia avino nervoze kaj forte prenis mian brakon. Rigardu, rigardu, nepo mia, rigardu, tiun junulon, kiu venas, li havas nenian vestaĵon eĉ ne etan bankostumon, kompreneble mi jam devis observi la menciitan junulon kaj

sekve klarigi al mia avino, ke la junulo ja kunportas bankostumon, nur okazas ke la koloro de la ŝtofo estas simila al tiu de la ĥaŭto pro la fakto ke la suno tre brunigis la korpon de la junulo. Pri tiu eraro mia avino kulpigis sian jam kadukan vidkapablon.

Por multaj maljunulinoj la nuntempaj kutimoj inter la gejunuloj estas motivo de severa kritiko. Por mia avino, kiu plene amas la liberon, la vivon kaj ĉion kio povas agrabligi nia ekzistadon, la afero havas alian karakteron, kvamkam ofte ŝi diras, ke ĉio havas sian permesatan limon.

Grandan scivolemon vekis ĉe mia avino la eksterlandanoj, la fakto, ke ŝi nenion komprenis kiam ili interparoladis.


Por ŝi tiu tago en la strando apartenis al tute alia mondo, kiun nenian antaŭe ŝi vidis.

Ni revenis hejmen kaj mia avino jam havis multon kion rakonti al siaj maljunaj najbarinoj, eĉ ŝi aspektis pli juna.

Ŝi konsilis min; nepo mia, agu dece kaj honeste sed vi profitu la vivon, ĝi forpasas rapide. Vi ne ploru morgaŭ pro tio kion vi ne faris hodiaŭ.

Jes, jes mia avino metis siajn piedojn en la akvon de la maro kaj eĉ gustumis ĝin, aldonante ke ĝi estas tre sala.

Ŝia humoro estis tiel granda, ke ŝi rakontis al mi la jenan spritaĵon:
Du vinvendistoj por la unua fojo troviĝis antaŭ la maro, unu el ili diris: se tiom da akvo fariĝus vino!. La alia respondis: ŝtultulo, kie ni povus trovi tiom da akvo por tiom da vino?



Luis Serrano Pérez
- SABADELL-

# HEJS - LOTERIO

Jes,la jaro finiĝas,kaj,kiel ĉiam,jen nia loterio aperas.Pasintjare ni sukcesis atingi kvinoblon de la



vetsumo,kaj nun ni jam aranĝis la aferon tiel ke ni trafos la unuan premion. Helpu en la aĉetado kaj disvendado de nia loterio por pliboniĝi la staton de niaj financoj.

Ni havas kvitancojn kies kosto estas 50Pts aŭ 10Pts,krom plia 20% (t.e.60Pts kaj 12Pts respektive)po unu kvitanco.Tiuj 10-ptaj estas aĉeteblaj minimume po 5 kvitancoj.

Do,ĉiuj interesitoj povas de nun mendi kiom ili volas.Limdato por mendi estas la 10ª de Decembro,do,post tiu dato ni ne plu akceptos mendojn kaj ni estos kore dankemaj se vi mendos kiel eble plej baldaŭ.Ĉiujn mendojn faru al S-ro. José Miguel Fernández

Str. Gregorio de la Revilla 21

BILBAO-11

Sendu la monon per poŝtmandato.

$ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $ $$$ $ $

HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISOANE-HISPANE

Como el año anterior,tenemos participaciones de lotería de 50Pts y 10Pts,más 20%,es decir,60Pts y 12Pts respectivamente. Las participaciones de 10Pts sólo se pueden adquirir a partir de 5.Pedidos a la dirección indicada arriba. Enviad el dinero por giro postal.

# kontaktoj kun kontakto

Komence de la nuna jaro mi skribis por HEJS informon pri "Kontakto" (vd. nro. 86) kun la celo ke la hispana junularo esperantista sciu ke ni havas veran revuon kiu pritraktas nuntempajn problemojn. Nun mi revenas denove al KONTAKTO, revuo kies enhavo ne reprezentas la oficialan opinion de TEJO, nek de la TEJO-estraro. KONTAKTO estas neŭtrala forumo de TEJO por liberaj interŝanĝo de pensoj kaj renkontiĝo inter kulturoj sur egala bazo sen lingvaj malfaciloj.

Mi klopodos resumi por vi la enhavon de KONTAKTO 1/1974. Finnlando nun deziras enkonduki en la lernejojn aktualigon de la historio-instruado. Per "Pli kompleta mondbildo", ni scias pri la finnaj klopodoj por plilarĝigi la historian perspektivon, ne nur traktante la eŭropan kulturon kaj la historion de la eŭropa komerco, sed atentante la historion de Azio, Afriko kaj Sudameriko rilate al la historio de Eŭropo laŭ la diversaj epokoj.

La intensan utiligadon de 'koeficiento de inteligento', la influon de la medio kaj de la hereda faktoro en la plenumo de testoj kaj kelkajn erarojn de testosistemo analizas la artikolo "Testokratio -pseŭdoscienca teroro de testoj".

Militjuro baziĝas sur Ĝeneva Konvencio de 1949, sed novaj aspektoj de armitaj konfliktoj devas esti entenataj kaj regulataj, kiel la gerilo, observo de la homaj rajtoj, protekto de la civila loĝantaro, politikaj kaptitoj kaj militkaptitoj. Win Jansen, en "Milita teroro kaj homaj rajtoj", konsideras ke agitoj, bankraboj, atencoj kaj similaj individuaj krimagoj ne estas klasifeblaj en la kadro de organizita kaj rekonebla ribelo.

Kelkajn problemojn por la progreso de Eŭropa Ekonomia Komunumo traktas Sam Uba en "Zigzago tra ĝangalo de interesoj". Bedaŭrinde, la Konsilio nur tro ofte implikiĝas en detalojn, tiel ke fariĝas malfacile aŭ tute ne eble atingi komunan decidon.

Kelvin Lokhart, naskita en Bahamoj, klarigis la motivon de sia "Reveno hejmen" jene: 'Mi kredas ke mi povas pli multe servi al mia raso en Afriko, ol kie ajn aliloke




en la mondo'. Dume, Radio Dakaro sukcese elsendas triblingve, por levi eduknivelon kaj fortikigi la konscion pri posedo de propra kultura tradicio.

Gravega estas la problemo kiun devas alfronti Hindio pro la multlingveco de la enloĝantaro. Estas jam 15 konstituciaj lingvoj, sed "Ĉu Hindio venkas sian propran lingvan kaoson?" Hindio, tamen, sukcesis doni realan kaj vivan enhavon al la formulo "Unueco en diverseco", kaj ĝi dankas tion al la observo de demokrata praktiko, kiu permesas ekvilibron inter libere esprimiĝantaj popolaj movadoj kaj la empiria linio de la federacia registaro.

'Min mirigis ne nur la socia sistemo, sed ankaŭ la ŝanĝiĝo de la homa karaktero', skribas Muramacu Jukijoŝi en "Intimaj interparoloj en Pekino". Li vizitis Ĉinion kiel oficiala gasto invitita de Ĉina Popola Respubliko. Laŭ ŝajne, la revo de la homaro finfine realiĝis en Ĉinio. Tie, mirinde, ĉiuj vivas tre honeste kaj vere modeste, por ke ili ankoraŭ klopodu konstrui la paradizon sur la terglobo. "Ĉinio malinvitis min" kaj la rajto inviti aŭ ne inviti kompreneble apartenas ne al gasto, skribas Mijamoto masao. Tial, li ne eblis persvadi ĈEL aliĝi al UEA. Cetere, tio apartenas al lia politika vivo.

Charles Chaplin, "La plej klaŭna klaŭno", estas simbola figuro de nia jarcento. Al li ni dankas ke, en nia jarcento, ekipita per lavmaŝinoj, raketoj kaj atombomboj, konserviĝis la rido. Kiu ne vidis liajn filmojn? Li ridigis la spektantojn por ke ili ne ploru pri la mondo, en kiu ili vivas.

Speciale interesa en la nuna momento, kiam li adiaŭis niajn vicojn por ĉiam, estas "La juna Lapenna". Ulrich Lins prezentas al ni tiun progreseman kaj revolucian Lapenna, kiu ŝanĝis la esperanto-movadon per ideoj bazitaj sur tri vortoj: neŭtraleco, demokrateco kaj unueco. Li kontraŭstaris la 'internan ideon', blufo kiu nur kaŝas la malsamajn ideojn de la samideanoj. Lapenna kritikis la tia-

man neŭtralecon, ĉar la neŭtralecon li rimarkis degeneri al ŝirmilo por malpermesi liberajn diskutojn, malebligadi sincerajn kritikojn aŭ laŭplaĉe eksigadi membrojn. Demokrateco devas akompani la neŭtralecon, por ke ĝi ne iĝu negativa fenomeno. Unueco super ĉio!: "...absolute devas ĉesi ĉiuj reciprokaj atakoj, kalumniadoj, personaj akuzadoj kaj subfosadoj. Nian tutan energion ni devas antaŭ ĉio dediĉi al la laboro por disvastigo de la lingvo kaj la e v e n t u a l a n 'plus-energion' kaj atakemon n i prefere direktu kontraŭ niajn komu najn malamikojn, ol kontraŭ n i n mem". Lia apelacio, en marto 1937, al jugoslavaj esperantistoj povas resumi lian tiaman idearon: "komune kunlaboradi kaj krei vere demokratian, fortan unuecfronton p o r batali kontraŭ la komunan malamikon, por venkigi fine Esperanton".



ĈU TEJO KAJ UEA?

Generaciaj miskomprenoj estas tiel ofta temo en la h o d i a ŭ a mondo, ke ĝi atingis eĉ la Esperanto-movadon.

Win Jansen opiniis ke la kontribuoj de Edsel Murphy al la klarigo de la konduto de vivaj k a j senvivaj estaĵoj ne estas taksataj laŭ siaj meritoj. Per "Paneo d u m demonstro" la aŭtoro celas atingi ke la leganto ekhavu pli bonan komprenon pri la persono Murphy, liaj leĝoj kaj ilia vasta aplikeblo kaj daŭre konstatata pravo en ĉiuj sektoroj de la socia vivo.

Kutima "Mozaiko" finas la enhavon de tiu ĉi KONTAKTO, r e v u o kiu preskaŭ neniam aperas ĝustatempe, sed ĝia enhavo estas ĉiam aktuala kaj freŝa. Ĉu vi jam havis <u>kontaktojn</u> kun KONTAKTO? Ne atendu kaj abonu ĝin.

JUAN AZCUÉNAGA

---

**31ª ijk okazos en Danlando**

**Ĉu vi ĉeestos?**

# KORESPONDAJ PAĜOJ

Tie ĉi vi povas trovi adresojn de gejunuloj en multaj landoj kiuj deziras korespondi kun hispanoj.

Ni varme konsilas al vi, precipe se vi estas lernanto, ke vi elektu unu el ili. Tio multe helpos vin en via lernado.

Jen la nomoj:

Pola 17-jara knabino. Ŝi ŝatas teatron kaj literaturon. Ŝi deziras interŝanĝi bildkartojn.

Barbara Jedrzejczak
Łódź-93-259
ul. Umińskiego 4 m 63 u 226
POLLANDO

Inĝeniero. Ŝi kolektas bildkartojn.

S-ino. Karin Kraus DDR-92 FREIBERG
Karl Kegel Strasse 100
Germana Demokratia Respubliko

Apotekvendistino. Ŝi kolektas poŝtmarkojn, malnovajn objektojn, gramofondiskojn, bildkartojn, k.t.p. 22-ja

F-ino. Sabine Shreier
9443 RASCHAU (ERZGEB)
Ernst Schneller-Strasse 84
Germana Demokratia Respubliko

28-jara inĝeniero. Li ŝatas teatron kaj vojaĝojn. Li kolektas poŝtkartojn kaj vojaĝprospektojn.

Achim Meinel
1.017 BERLIN
Leninplatz 31
Germana Demokratia Respubliko



20-jara studentino. Ŝi kolektas bildkartojn.

Jitka Dopitova
M. Majerove 16
68201 VYSKOV na Mor
ĈEĤOSLOVAKUJO

Skowiriski Stawomir
Stawiriskiego 18-8
21-040 Swidnik
POLLANDO

14-jara knabino. Ŝi deziras korespondi kun 14-15-jara knab(in)o.

Eva Morschauser
7754 Bóly
Szegfű u. 14 HUNGARUJO

14-jara knabino.Ŝi deziras korespondi kun 15-17-jara knabo.

Suzana Hartmann
H-7754 Bóly.Fáy u.8
HUNGARUJO



16-jara studentino.Ŝi kolektas insignojn.

Olgica Tomik
Dunavska 100
54000 Osijek
JUGOSLAVIO

13-jara knabino.Ŝi ŝatas librojn kaj vojaĝojn.Ŝi kolektas poŝtmarkojn,bildkartojn kaj buŝtukojn.

Jadranka Rožić
Kobiljak 6
41261 Sesvetski Kraljevac (ZAGREB)
JUGOSLAVIO

19-jara knabino.Ŝi deziras korespondi pri turismo,libroj,muziko.

Novotny Lidija
Ive Seremete 21
74400 DERVENTA
JUGOSLAVIO


16-jara lernantino.Ŝi kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj insinojn,kaj deziras korespondi kun 15-20-jara knab(in)o.

Mária Judit Bosnyák
Kossuth út 126
B.A.Z. megye.Magyarország
HUNGARUJO


GASTIGOFERTO!!
================

20-jara Italo el Pisa deziras senpage gastigi en sia urbo sam- aŭ malpli aĝaj.En eventuala vojaĝo al Hispanujo li dezirus esti gastigata de la samaj personoj.Li ankaŭ deziras korespondi.

Paolo Cerretini
Via di Goletta 55
I-56100 PISA
ITALUJO



# krucvortenigmo



**Horizontale**: 1ª Tio, kio impresas la flarsenson. Vokalo. 2ª Seneduka, petola knabo. Prepozicio montranta direkton. 3ª Sub la kondiĉo, ke ... Kristaliĝinta akva vaporo, kiu defalas de la atmosfero laŭ formo de blanaj kaj malpezaj floketoj. 4ª Vokalo. Tia, ke ĝia rando estas tranĉa aŭ ĝia pinto pika. 5ª Fari ĝojan voĉbruon. 6ª Konsonanto. Vokalo. Nutraĵo. 7ª En ia loko. Finaĵo de pluralo. Sufikso esprimanta la malplej altan gradon de grandeco.

**Vertikale**: 1ª Rigardi atente kaj esplore. 2ª En la dua loko. Vokalo. Vokalo. 3ª Siberia rivero (radiko). Daŭre, ripete. 4ª Eligi bruon dormante. Konsonanto. 5ª Vokalo. Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo. Vokalo. 6ª Havanta ian aĝon. Interjekcio. 7ª Aparato, instrumento. Sufikso de futura pasiva participo.

tao

Se vi havas ian ajn talenton por komponi muzikon aŭ muzikeblajn tekstojn, skribu pri ĝi por tao al HEJS. Dankon!

